

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 5 (84) oktobro 2014

Karl Breuninger (maldekstre) dum TEMoj



en la numero

*Viva metiejo – Karl Breuninger
Rusiaj Esperanto-Tagoj en 2015 – apud Ĉeboksari
RA-9 en Altaĵo pasis sukcese
forpasis A.Butkeviĉ, O.Krasnikov, V.Masalkin kaj A.Grzębowski
versaj impresoj de Klara Ilutoviĉ pri TEMoj*

Moskvo, 2014

enhavo

- 01 *Mia eksterordinara rilato kun Rusio (Sovetio) (K.Breuninger)*
- 13 *Rusiaj Esperanto-Tagoj*
- 14 *TILE-8*
- 14 *Laŭ materialoj de la forumo pri REU ĉe la socia reto "VKontakte" (M.Ĉertilov)*
- 16 *Letero el UEA*
- 17 *Membrolisto de REU por 2014*
- 17 *Priesperanta doktora disertacio*
- 18 *Forpasis Anna Butkeviĉ*
- 19 *Dumkongresa forpaso*
- 19 *Forpasis Vladimir Masalkin*
- 20 *Lomi gastigas (M.Karceva)*
- 21 *Membrostatistiko de UEA je la 1-a de septembro*
- 22 *Nelingva festivalo (M.Karceva)*
- 24 *Memore al O.Krasnikov*
- 25 *Esperanto-Vikipedio: jam pli ol 200.000 artikoloj*
- 25 *CO invitas al la Malferma Tago*
- 26 *Aperis "Belarta rikolto 2014"*
- 26 *Belartaj Konkursoj de UEA en 2015*
- 27 *Biblioteka apogo Bachrich unuafaze subvenciis*
- 27 *Samarkando en ĉiuj kontinentoj (A.Ionesov)*
- 29 *Versaj impresoj de Klara Ilutoviĉ pri TEMoj en Tiĥvin*
- k3 *Renkontiĝo de Amikoj*
- k4 *Invito al RET*



Karl Breuninger dum la infaneco en Sovetunio

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 5 (84) oktobro 2014
aperadas ekde 2000

redaktas Georgij Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

poŝta adreso: Pjatickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2015:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KŜ – 680 rubloj, sendantaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo "Яндекс.Деньги"

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj
*pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*
elektronika abono – 350 rub. (10 eŭr.)

Karl Breuninger (Germanio)

MIA EKSTERORDINARA RILATO KUN RUSIO (SOVETIO)

Resumo:

22.10.1946 – translokiĝo al Sovetio

1946-1950 – Kujbiŝevo

1950-1955 – Moskvo (Kuncevo, Tuŝino)

1955-1958 – Suĥumi

12.02.1958 – reveno al Germanio

1970 – la unua revizito de Sovetio kun la edzino

1994 – revizito de iama Kujbiŝevo kun mia patro

1994-2014 – diversaj aktivecoj rilate al iama Sovetio


Mi naskiĝis en 1944 en Landsberg/Lech, Bavario.

Miaj gepatroj estis hazarde en tiu bela urbeto apud Aŭgsburgo dum mia naskiĝo. Mia patro laboris en militindustrio en Berlino kaj pro tio ne devis militservi kaj batali ĉe la fronto. Pro la bombardado de Berlino jam ekde 1940 gravaj industriaj kompleksoj estis translokitaj al Mez- kaj Sudgermanio kaj interalie ankaŭ al Landsberg en Bavario. Mia patro ofte devis deĵorvojaĝi el Berlino al Sudgermanio.

Post la milito ni denove loĝis en Orient-Berlino; mia patro unue estis senlabora, sed post iom da tempo trovis laboreblecon en la firmao *Askania* tiam gvidata de sovetia administracio sub la labortitolo OTB (*Opitno-teĥniĉeskoje bjuro*, eksperimenta teknika oficejo). Tie la sovetianoj kolektis teamojn de fakuloj por pluevoluigi stiradteknikojn de raketoj kaj aviadiloj. La sovetianoj tre zorgeme observis la germanojn kaj taksis ilian kompetencon. Neatendite la 22-an de oktobro 1946 frumatene miaj gepatroj estis vekitaj de laŭta frapado je la pordo, kaj eniris sovetia oficeiro kun armitaj soldatoj. La oficeiro deklaris ke laŭ la kontraktoj

de Jalto kaj Potsdamo (inter Sovetio, Usono kaj Britio) Germanio devas reparacii militdamaĝojn kaj tio ankaŭ entenas homan laboron. La germanoj devas prepari ĉion por translokado al Sovetio. Oni preferas se la familianoj kunveturos kaj la soldatoj volonte helpus paki meblojn kaj aliajn privataĵojn, kiel vestaĵojn, librojn ktp. Al la demando, kio okazos se oni rifuzas

V
I
V
A
M
E
T
I
E
J
O





translokiĝi, la oficiro senvorte montris al la pafiloj de la soldatoj. Ĉie en la tiel nomata sovetie okupita parto de Germanio tio okazis samtempe, kaj entute kelkmil fakuloj estis arestitaj. En multaj urboj jam staris trajnoj kun person- kaj ŝarĝvagonoj pretaj por tuj forveturi. Kontraŭe al Usono oni kunprenis ĉiun laboriston de ĉiu nivelo, do ne nur la ĉeffakulojn. La sovetianoj samtempe enpakis ĉiajn ekipaĵojn de la entreprenoj, ekzemple seĝojn, tablojn, diversajn maŝinojn, desegnotabulojn, personajn skribaĵojn. Tiel la germanoj post la alveno en Sovetion retrovis preskaŭ la samajn laborkondiĉojn kiel en Germanio.

Ni posttagmeze forveturis kaj post 14 tagoj atingis Upravlënĉeskiĝ gorodok – antaŭurbon de Kujbiŝevo (nun denove Samaro) ĉe la Volgo. Tien alvenis ĉirkaŭ 700 inĝenieroj kun familianoj (entute pli ol 2000).

Dum la unuaj jaroj pli da germanoj ol sovetianoj loĝis tie.

Ni loĝis en novkonstruitaj ŝton- aŭ lignodomoj. Poste ni eksciis ke ankaŭ germanaj militkaptitoj konstruis tiujn domojn. La sovetia entrepreno jam ekfunkciis dum la mondmilito, kaj poste oni decidis ke ĝi servu kiel evoluadcentro por aviadilmotoroj kaj turbinoj. La plej multaj fakuloj ja venis el Dessau kaj Stassfurt kie estis la firmaoj *Junkers* kaj *BMW*. Tiuj fakuloj laboris en la 1-a kaj 2-a konstrukssekcioj. Mia patro kun siaj kolegoj el orient-Berlino (iama firmao *Askania*) laboris en la 3-a sekcio.

La administracio zorgis pri la bonfarto de la germanoj. La salajro de la germanoj estis pli alta ol tiu de la sovetianoj, kvankam ili kune laboris en teamoj. La celo estis ke la germanoj rapide plenumu sovetiajn taskojn kaj samtempe instruu junajn sovetiajn inĝenierojn.



Заседание ученического комитета (учкома) в немецкой школе № 88, пос. Управленческий. Начало 1950-х гг. Автор неизвестен, немецкий специалист.

Филиал РГАНТД, Ф. Р-912, Оп. 1, Д. 13.

Por la multaj germanaj infanoj oni instalas specialan lernejon, kaj pro manko de sovetiaj instruistoj ankaŭ kelkaj germanoj rajtis instrui pri siaj fakoj, do matematiko, fiziko, kemio ktp. Tiel ankaŭ kelkaj virinoj ricevis ŝancon labori, ĉar la edzinoj ĝenerale ne laboris kaj nur hejme mastrumis.

Kiel kutime en Sovetio ankaŭ la germanoj devis partopreni en politikinformrondoj aranĝitaj de specialaj politikkomisaroj dum la laboro; multaj germanoj rezistis kaj la administracio akceptis tiun rifuzon.

En la libera tempo la germanoj okupiĝis sporte kaj kulture. Kelkaj bedaŭrinde malsaniĝis kaj mortis. Dum la unua vintro ni suferis pro la frosto, sed baldaŭ ni ankaŭ kutimiĝis ĝui la daŭran froston kaj neĝon. La germanoj festis la kutimajn kristanajn festojn kiel ekzemple kristnaskon.

Ĉar la sekcio, en kiu laboris mia patro jam en Germanio, okupiĝis ne pri aviadilmotoroj sed pri elektromekanika stirado, ĝiaj anoj laboris preskaŭ senŝarĝe kaj iam la administracio rimarkis tion kaj serĉis taŭgan taskon por ili. Ankaŭ kelkaj germanoj insistis ricevi utilan kaj interesan laboron. Somere de 1950 rusa gravulo veturis Moskvon por serĉi taŭgan taskon por la germanoj, post la reveno li anoncis ke la OKB-3 (*Opitno-konstruktorskoje bjuro*) devas translokiĝi al Moskvo (unue Kuncevo, poste Tuŝino). Tien la sovetia administracio alvenigis du aliajn grupojn de germanaj fakuloj, kiuj en aliaj urboj jam laboris dum 4 jaroj kaj tie finis la taskojn. Aldone multaj tiel nomataj politik-kaptitoj el Germanio pligrandigis la grupon. Ĉiu el tiuj 100 fakuloj devis nun ĉe "Sokol" kunlabori por evoluigi stiradon de



defendraketoj interalie kontraŭ aviadiloj. Tiu fakgrupo estis komandata de konsilantaro de sovetiaj ministroj, kies ĉefo ĝis 1953 estis L.P.Beria. Por stimuli la germanojn la administracio ofertis kontraktojn en kiuj oni promesis ke





post sukcesa rezulto de la laboro ĉiu reveturos Germanion. Kelkaj germanoj ne fidis kaj ne subskribis, sed tio tute ne havis ian influon al la daŭro de nia restado en Sovetio.

La speciale konstruita setlejo en Tuŝino (nun Nord-Tuŝino) enhavis ĉirkaŭ 80 dometojn, nomatajn finnlandaj kaj germanaj depende de tio, el kiu lando ili estis liveritaj kiel militkompenso. Ligna 3-metra alta barilo ĉirkaŭis

la setlejon kaj la plenkreskuloj rajtis forlasi ĝin nur kun akompananto el sekreta polico. Ili ĉiam estis kune, ĉe aĉetado en bazaro aŭ magazeno, ĉe vizito de polikliniko, ĉe vizito de teatraĵoj kaj eĉ se iu devis resti en malsanulejo: sana gardisto dormis en la sama ĉambro kun la malsana germano. Esceptoj estis nur severaj infektoj kaj gravedecoj. Ĝenerale la germanoj ne sciis la rusan lingvon kaj pro tio la akompananto ankaŭ servis kiel helpanto kaj tradukisto. Ankaŭ dum turistvojaĝoj tra Sovetio ili akompanis nin kaj evitis ke ni survoje hazarde aŭ intence interparolu tro kun lokanoj. Se la rusoj tro insistis ion ekscii de ni, la gardistoj laŭte malpermesis tion kaj la alparolintoj ŝajne tuj komprenis kaj silentis. Mia patro faris kun mi (kaj mallibervole sovetia akompananto) du grandajn vojaĝojn. La unua estis ŝipe tra Moskva-Volga kanalo al Gorĵkij kaj reen ŝipe laŭ Oka, la dua aviadile al Stalingrado, trajne al Soĉi, ŝipe al Jalto kaj aŭtobuse reen al Moskvo.

En 1953 naskiĝis mia fratino Emma kaj mia patrino ĝuis la tempon en la malsanulejo sen akompananto de sekreta polico.

En 1951 mi fariĝis 7-jara kaj devis viziti lernejon. Por la unuaj 4 klasoj oni instalas specialan lernejon en la setlejo. La instruistoj estis sovetianoj, el kiuj kelkaj bonege parolis germanan lingvon. Do la instrulingvo por ni (6 germanaj geknaboj) dum la unuaj 4 jaroj estis la germana kaj ni uzis lernolibrojn eldonitajn por la rusgermanoj de diversaj regionoj de Sovetio en la tridekaj jaroj. La rusan lingvon ni lernis kiel fremdlingvon. La pli aĝaj infanoj vizitis en Tuŝino nor-



malan rusan mezlernejon, kie ĉio estis instruata ruslingve. Ankaŭ kelkaj gejunuloj studis en diversaj altlernejoj de Moskvo, kaj tie ili ankaŭ estis observataj de sekreta polico kaj tamen povis kontakti studentojn el amiklandoj (eĉ GDR).

Survoje al la studejoj kelkaj kaptis la ŝancon kontakti eksterlandajn ambasadorojn por transdoni listojn kun la nomoj de ĉiuj germanoj loĝantaj en Tuŝino. La oficiala germana administracio unue kontestis la ekziston de nia grupo: iliaj funkciuloj ĉiam parolis nur pri militkaptitoj, sed al tiu kategorio ni memkompreneble ne apartenis.

Kelkaj infanoj (ankaŭ mi) somere vizitis pionirtendaron apud Moskvo. Ni ne portis pionir-vestaĵojn kaj tiel ĉiu tuj ekkonis nin. Ni tre ĝojis pri la 4 semajnoj tie. Bedaŭrinde ni ne sukcesis iam ĝui la pionirtendaron Artek en Krimeo, kvankam ni jam estis enskribitaj kaj pretaj. Lastmomente iu el la administracio rimarkis, ke ni tie povus kontakti eksterlandajn infanojn de tiel nomataj amiklandoj de Sovetio kaj tiel malkaŝi nian ekziston.

Miaj gepatroj ĉiun semajnon skribis leteron al siaj gepatroj kaj gefratoj en Okcident-Germanio: ĉiu letero estis numerita kaj la akceptanto en Germanio tuj respondis kaj menciis kiun leteron li ricevis. Se iu letero ne atingis Germanion, mia patro sciis ke ĝi enhavis ion malpermesitan kaj li denove sendis leteron, nur iomete ŝanĝinte la enhavon. Tiel li sukcesis informi la parencojn pri nia situacio. Kelkaj germanoj eĉ sendis paketojn kun vivrimedoj hejmen, ĉar la situacio en Germanio dum kelkaj jaroj post la milito estis pli malbona ol en Sovetio. La gepatroj neniam sciis ĉu ili iam povos hejmenveturi; tiun zorgon ili ne montris al la infanoj, ni ĝuis la infan-vivon. De Germanio ni ricevis poŝtpaketojn kun libroj, vestaĵoj kaj je la fino de nia restado eĉ teknikaĵoj ks.

En 1955 la germanaj fakuloj tiel sukcese finis la taskon, ke kelkaj el ili eĉ ricevis premiojn, interalie la tiel nomatan Stalin-premion. Eble vi memoras ke la 1-an de majo 1960 usona spionaviadilo estis pafe faliĝita (Powers) apud Sverdlovsko, do tre verŝajne la bazon de tiu tekniko parte evoluigis la germanoj. Sed samtempe la administracio





anoncis ke anstataŭ hejmenveturi ni devas translokiĝi al Suhumi por du jaroj, post kio la fakscioj de la specialistoj ne plu estus tiel aktualaj ĉe la reveno al Germanio. La germanoj konsideris tion kiel punon. Por la rusoj tute surprize la virinoj protestis kaj la viroj eĉ bojkotis laboron dum kelkaj tagoj. La infanoj influitaj de la sovetiaj propagandfilmoj manskribis ruslingvajn flugfoliojn kun teksto: “Ni ne volas

translokiĝi al Suhumi – ni volas hejmenveturi”. Tiujn flugfoliojn oni trovis pendigitaj ĉe multaj telegraffostoj ekster nia setlejo en Tuŝino. Komence de septembro la kanceliero Adenauer el Okcident-Germanio vizitis Moskvon kaj neniu de ni rajtis forlasi nian setlejon. Rezulte de la intertraktoj Adenauer proklamis ke li sukcesis atingi, ke ĉiu enprizonigita germano (militkaptito) nun povas hejmenveturi, kaj li ĝuis honorigon pro tio, sed pri nia grupo neniu parolis. La protesto de niaj gepatroj ne helpis, kaj fine de septembro ni veturis trajne al Suhumi, pli precize al ĝia antaŭurbo Agudzera. Tie jam ekde 1945 laboris germanaj fakuloj pri atomscienco, eble vi iam aŭdis ion pri Prof. von Ardenne. Ili jam printempe hejmenveturis kaj postlasis al ni siajn iomete pli luksajn loĝejojn.

Tie ni ricevis pasportojn, por ke ni povu forlasi sen ia akompano la setlejon. En distanco 3 km ĉirkaŭ la setlejo ni rajtis moviĝi libere, do ni povis naĝi en la maro, viziti poliklinikon kaj bazaron. Ne plu ekzistis speciala lernejo por ni, do mi devis viziti la 5-an klason de normala sovetia lernejo. 5 germanoj kun 27 rusoj, tio estis tre granda ŝoko por ni, ĉar nia scio de la rusa lingvo ne estis perfekta. Do niaj gepatroj dungis helpinstruistinojn, kiu tre lerte instruis nin kaj eĉ helpis nin trapasi la ekzamenojn je la fino de ĉiu lernojaro. Dum la instruadperiodo ni ofte devis helpi rikolti ion: tabak-, tefoliojn, aŭ mandarinon. Dum la somero ni ĝuis dum tri monatoj



la maron. Interese estis ke ni ne rajtis uzi akvomatracojn kaj remboatojn, ĉar je alia flanko de la maro situis malmika lando kaj regule landlimgardistoj rondiris piede aŭ ĉevale kaj observis nin. Ni ankaŭ faris ekskursojn en la regiono.

Intertempe aperis du diversaj germanaj ŝtatoj, kaj la administracio demandis ĉiun al kiu li volus hejmenveturi.

Multaj decidis por GDR, sed ekzemple mia patro ne; la kialo estis simple ke niaj parencoj vivis en Bavario kaj Virtembergo, do por mia patro ne estis senco elekti GDR-on.

Ankaŭ alvenis oficialulo el GDR kaj intense varbis por reveturo al sia socialisma lando. Li ofertis tre altan salajron kaj laborpostenon, sed tamen ĉirkaŭ 20 fakuloj rifuzis la oferton.

En septembro 1956 la unua grupo reveturis al Orient-Berlino, sed ni atendis ĝis januaro 1957, kiam la administracio anoncis por ni ŝokan informon: ĉar ni decidis reveturi al malamika ŝtato, ni devas 2 jarojn pli longe resti en Sovetio. Tiel oni pensis, por ke la fakscio de niaj patroj ne plu estu tiel aktuala por Usono kaj Britio. Sed la sovetia administracio ŝajne malbone sciis kiel facile en tiu tempo oni povis translokiĝi el Orient-Berlino al Okcident-Berlino. Post la reveno aŭtune en GDR kelkaj fakuloj tuj translokiĝis Okcident-Berlinon, kie ili estis pridemanditaj de diversaj okcidentaj sekret-organizoj. Kvankam ni pune restis en Sovetio, la malamikaj sekret-organizoj jam eksciis preskaŭ ĉiujn detalojn pri la laboro de niaj patroj en Sovetio. Nun ni iomete rezignis, kaj kelkaj ŝanĝis sian decidon kaj ekvolis reveturi al GDR.

Subite komence de 1958 oni anoncis ke ni baldaŭ povos trajne hejmenveturi kaj rajtos ĉion kunpreni. Tamen ni forvendis aŭ donacis

meblojn al lokaj sovetianoj kaj enpakis nur vestaĵojn, librojn, ludilojn kaj fotojn. Venis kontrolistoj por inspekti ĉion kaj ekzemple tre akurate trarigardis skribaĵojn, fotojn kaj filmojn. Se sur iu bildo estis videbla malpermesitaĵo (stacidomo, ponto, stratkruciĝo aŭ soldato), do ili forprenis tion. Ni ekveturis el Suĥumi la 8-an de februaro 1958 kaj 4 tagojn poste ni finfine atingis Frankfurton ĉe Odoro, kaj de tie nian grupon transportis speciala trajno, kiu kutime konektis Pragon kun Orient-Berlino, al akcept-kampejo Friedland en Okcident-Germanio. Tiun kampejon ĉiu enmigranto kaj fuĝinto devis trairi. Nin atendis amaso da ĵurnalistoj, kaj niaj patroj estis ofte intervjuitaj.

Poste dum 2 tagoj ni veturis al Ulm. Tie mia patro tuj trovis laboron ĉe *Telefunken* en la sama fakkampo kiel en Sovetio. Tamen li ne tuj komencis labori, sed unue dum 4 monatoj estis intervjuita de usona sekretmilitpolico. Ili jam preskaŭ ĉion sciis kaj nur komparis siajn sciojn, ricevitajn el diversaj fontoj.

Kiam ni forlasis Suĥumi, mi vizitis la 7-an klason, kaj nun en Germanio pro



Suchumi, Bus-Ausflug

manko de scio de la angla lingvo mi devis komenci denove en la 7-a klaso. El vidpunkto de miaj samklasanoj mi estis ekzotika knabo veninta de malamika lando, kelkfoje oni nomis min Ivan, kaj mi memoris ke en Moskvo kelkfoje mi estis nomata faŝisto. La rusa lingvo estis tute malŝatata, kaj ni ne plu praktikis ĝin.

Mia fratino, kiu 5-jara forlasis Sovetion kaj flue parolis la rusan lingvon, post duonjaro ne plu kapablis paroli tiun lingvon; kiel plenkreskulino ŝi lernis ĝin denove.

Ekde 1960 la iamaj specialistoj, kiuj devige laboris en Sovetio, ĉiun jaron kunvenis por interŝanĝi informojn pri la privata progreso en Okcident-Germanio. Jam kelkajn jarojn neniu el tiuj viroj plu vivas, sed la infanoj daŭrigas tiun kutimon kunveni ĉiun jaron en alia germana urbo. La homoj en GDR tute ne rajtis organizi tiajn kunvenojn, ili eĉ ne rajtis publike paroli pri sia vivo en Sovetio: ekzemple studento kiu fariĝis instruisto de la rusa lingvo ne povis rakonti kie li tiel perfekte lernis la lingvon. Pro tio tuj post la fino de GDR ili ekkunvenis ĉiun duan jaron.

Kiam mi studis en Stutgarto, mi trovis parolkurson por rusparolantoj. En Okcident-Germanio loĝis multaj rifuĝintoj el GDR, kiuj mallibervole sciis la rusan lingvon; malmultaj el ili vizitis tiun kurson.



Post la geedziĝo je la fino de mia studado mi vidis afiŝon de turistoficejo, kiu ofertis flugon al Soĉi, kaj mi tuj pensis pri ebleco ekskursi el Soĉi al Suhumi. En tiu tempo jam kelkaj okcidentgermanoj kuraĝis vojaĝi al Sovetio, kelkaj eĉ uzis tiun eblecon por kunveni kun parencoj aŭ amikoj el GDR. Nin konfuzis ke la germanoj el GDR en la restora-

cioj estis malpli bone servataj ol la malamikoj el la okcidenta parto, do jam tiam la mono influis konduton.

Do ni flugis en aŭgusto 1970 tien, faris ekskurson al la lago Rica, al Suhumi kaj tie mi dum la busrondvojaĝo rekonis multon. Mi alparolis la lokan gvidantinon kaj ŝi rememoris la ĉeston de germanoj. Mia edzino kaj mi por 3 tagoj vizitis ankaŭ Tiflison kaj Erevanon, kaj por mia edzino estis stranga afero ke ni surstrate estis alparolataj de oldulino (“babuŝka”), kiu volis malpermesi al mi fari foton de bela malnova parto de Tifliso. Ni interparolis, kaj ŝi demandis: el kiu parto de Germanio? Mi respondis: el la okcidenta. Kaj ŝi tuj finomis min faŝisto. Mi diskutis longe kun ŝi, kaj mi komprenis ŝin, ŝi estis partizanino dum la dua mondmilito kaj ege suferis sub la germana armeo; poste ŝi invitis nin al sia subtera loĝejo, rakontis multon kaj finfine mi komprenis ke ŝi petis monon de mi. Mi donacis al ŝi 15 rublojn (monata luprezo de ŝia loĝejo), kaj ŝi konstatis ke dank’ al mia juneco mi ne povas esti faŝisto.

En 1975 mi denove feriiis en Soĉi kaj tiam renkontis Nina Pirojnaja kaj Vladimir Bepalov, ĉar intertempe mi kaj mia edzino esperantiĝis. Nina tiam publike

varbis per Esperanto-ŝildo en akceptejo de la hotelo. Kune ni vizitis la gastejon “Staraja melnica” (Malnova muelejo), kaj tie mi havis problemojn kun aliaj ĉeestantoj: mi fotis Nina, Vladimir kaj mian edzinon dancantajn kaj denove spertis ke foti publike estis malĝentile en Sovetio (kaj nun ni vidas preskaŭ ĉion en Fejsbuko).

Dum la tiama ekskurso al Suhumi mi kuraĝis viziti mian iaman lernejon, kaj eĉ kelkaj instruistoj rekonis min, poste ni vizitis vidvinon de la direktoro.

Ekde 1971 ni loĝis en Munkeno kaj tie vizitis babilkurson por rusparolantoj, en tiu tempo multaj diverskategoriaj rifuĝintoj el Sovetio loĝis en Munkeno, fuĝintoj en 3 diversaj ondoj atingis Munkenon: la unua – post la revolucio, la dua – dum la 30-aj jaroj kaj la tria – post la dua mondmilito. Ĉiu havis sian propran sperton. Kelkaj el ili laboris en diversaj radiostacioj por elsendi propagandon al Sovetio kaj Orient-Eŭropo.

Ekde 1978 ni loĝas en antaŭurbo de Munkeno Germering. Per Esperanto ni havis multajn kontaktojn kun alilandanoj, kaj baldaŭ vizitis nin kelkaj el Orient-Eŭropo: Hungario, Rumanio kaj Bulgario. Tuj post la disfalo de Sovetio vizitis nin jam en 1990 Nina Pirojnaja el Soĉi kun sia edzo. Ni kune vizitis iaman koncentrejon Dachau, kie nun troviĝas vasta memorejo. Post la vizito mi ŝin demandis, ĉu ŝi povus imagi ke iam ankaŭ en Sovetio oni instalos analogajn memorejojn pri la gulago, kaj ne surprize por mi ŝi neis tion. En la sama jaro ni gastigis dum 3 semajnoj du infanojn el Ĉernobilo. Loka aktivulino en nia urbeto ĉiun jaron organizis eblecon por ĉirkaŭ 30 infanoj el la radioaktive malpurigita zono de Ukrainio ripozi en nia regiono. Por la infanoj tiu vojaĝo laŭ mia impresado estis ŝoka, ili vidis nian riĉecon kaj malgaje reveturis. Tiaj aktivecoj ekzistis en tiu tempo ĉie en Germanio.

Pro la malfermo de Sovetio mia patro baldaŭ planis viziti la ĝis tiam fermitan urbon Samaro. Do en 1994 ni ambaŭ flugis al Moskvo, vizitis tie la kvartalon Tuŝino kaj poste daŭrigis vojaĝon al Samaro. Jam en la 4-persona kupeo ni, du germanoj, intense interparolis kun du rusaj inĝenieroj el Samaro. Ili tuj sciis al kiu kategorio mia patro apartenis, ili eĉ sciis la nomojn de kelkaj tiamaj direktoroj de la firmao en Upravlenĉeskij gorodok kaj rakontis ke la influo de la tiamaj germanoj ĝis nun estas rimarkebla en la entrepreno, ekzemple la paŭzo por la tagmanĝo ankoraŭ en 1994 estis 1 horo kaj 30 minutoj, pri tio en 1946 insistis la germanoj, ĉar ili volis agrable tagmanĝi hejme kun siaj





edzinoj.

Mia patro kiel SAT-ano kontaktis Valentina Lisijenkova antaŭ nia vojaĝo, kaj ŝi multege helpis nin, ni ankaŭ vizitis nian iaman loĝejon kaj ne anoncote frapis je la pordo, avino malfermis kaj mia patro sin prezentis, kaj ŝi tuj invitis nin por trinki teon, estis vere kortuŝa afero. Ŝia filo estis milicano kaj post hejmenveno li tuj organizis boaton kun motoro, kaj lia konata ŝoforo rond-

veturigis nin tra la bela rivero Volgo. Tiam ni ankaŭ konatiĝis kun la loka E-grupo.

Post nia reveno mi hazarde eksciis pri societo, kiu en Munkeno aktiviĝis por helpi post la disfalo de Sovetio maljunulojn loĝantajn en Moskvo. La rusaj partneroj aktiviĝis en Tuŝino, kaj mi tuj decidis subteni kaj kunlabori en la munkena asocio. Ni kolektis multe da mono kaj sendis tion al Moskvo por aĉeti bazajn medicinajn helpilojn por maljunuloj. Samtempe nia partnero instalas lernejon por eduki maljunul-flegadon al junaj virinoj, kaj por praktiki ili dum 18 monatoj laboris en Munkeno en maljunulejoj. Mi helpis ilin surloke solvi diversajn problemojn. Dum 20 jaroj ni kolektis en Germanio pli ol 2 milionojn da eŭroj kaj helpis ĉiun jaron ĉirkaŭ 300 rusajn maljunulojn.

En 1996 mi denove vojaĝis al Samaro kun granda grupo de tiel nomataj infanoj de specialistoj. Mi persone flugis kun mia amiko per rekta aviadilo al Samaro, kaj je alveno en la flughaveno ni estis arestitaj, ĉar nia vizo estis grup-vizo, sed ni envojaĝis individue. Ni devis tranokti en la flughaveno, kaj oni planis nin resendi tuj en Germanion. Bonŝance la direktoro de la germana turistoficejo kunflugis en la sama aviadilo, rimarkis la problemon kaj sukcesis solvi ĝin dum la sekva tago. Sed



tamen tio estis granda ŝoko por ni ambaŭ, kaj poste ni ĉiam ŝvitis vojaĝante al Rusio. Nia grupo estis oficiale akceptita de lokaj homoj de la entrepreno. Post 3 tagoj ni ŝipe veturis al Moskvo, survoje ni ankaŭ vizitis aliajn urbojn kie germanoj post la milito devis labori.

En 1997 granda E-grupo el Samaro venis al

la ĝemelurbo Stuttgart kaj 5 el ili tranoktis survoje ĉe ni en Munkeno.

En 1999 mi vizitis kun mia edzino Moskvon kaj Sankt-Peterburgon kaj tiam jam konatiĝis kun Valeria kaj Nelli.

En 2000 mia edzino kaj mi kun aliaj germanoj veturis al Samaro, kie ni ĝuis belecon de Volgo kaj belajn plaĝojn sur diversaj insuloj apud Samaro. Krome ni vizitis kelkfoje samideanojn kaj intertempe aliajn konatojn.

En 2002 neanoncite Mikaelo Bronŝtejn tranoktis la unuan fojon ĉe ni en Germering, kaj en somero de la sama jaro ni kunvenis denove en Sankt-Peterburgo, tiam mi vojaĝis kune kun nia helposocieto al Rusio por konvinki niajn sponsorojn ke iliaj donacoj ĝuste atingis helpbezonantojn.

Aŭtune 2003 tranoktis ĉe ni vere interesa juna paro el Moskvo, Miŝa kaj Maŝa. Ili geedziĝis kaj decidis fari nuptan vojaĝon petviture el Moskvo al Ĝibraltaro. Ili retletere demandis min, ĉu ili povus dimanĉe vespere alveni kaj lunde forveturi. Mi demandis ilin, kial ili povus esti certaj alveni tiel akurate. Dimanĉe vespere ili ne alvenis, sed nokte je la dua ili alvenis; la kialo estis ke je la lasta halto ili demandis ŝoforon kunpreni ilin al Germering. Tiu germano komprenis Germaringen kaj jesis, tiu alia urbeto estis 150 km for de la nia, kaj ili rimarkis tion nur survoje. Kiam ili alvenis en nian urbeton, ili preterpasis policejon kaj timis demandi la piedvojon al nia domo, verŝajne ili ne fidis policon. Lunde mi transportis ilin al benzinejo je granda ŝoseo al Italio, kaj ili tuj trovis ŝarĝaŭtomobilon por kunveturi. Post kelkaj monatoj ili sendis al mi detalan raporton pri la tuta sukcesa vojaĝo. Antaŭ kelkaj jaroj ili denove vizitis nin, sed ĉi-foje per luaŭto.

Iam en 2003 mia konato en Moskvo sendis al mi rusan artikolon el loka reklamgazeto. En ĝi iu virino nostalgie priskribis la vivon en Tuŝino dum la 50-aj jaroj kaj interalie menciis ke malantaŭ ligna barilo loĝis germanoj kaj ŝi kontaktis la infanojn tra la truoj en la barilo. Mi skribis legantleteron kaj prezentis





min kaj petis, ĉu iu eble scias pri mia unua rusa instruistino, kaj nekredeble – post 2 monatoj mia iama instruistino kontaktis mian amikon en Moskvo. Do mi decidis vojaĝi Moskvon en 2004, kaj mi vizitis mian instruistinon el 1951, kia surprizo kaj agrabla kunveno. Ŝi favore memoris tiutempe instrui ger-

manajn infanojn; ŝi, estante 84-jara, bonege parolis germane.

En 2005 venis al ni Mikaelo Lineckij kun sia amikino kaj du knabinoj el nia ĝemelurbo Kievo kaj koncertis en la internacia ĝarden-ekspozicio.

En 2006 Svetlana Smetanina organizis busvojaĝon de rusaj samideanoj al UK en Florenco; ili haltis vespere por la necesa paŭzo de la ŝoforoj kaj la lokaj munkenanoj ĉiĉeronis por ili tra la nokta urbo.

Lastfoje mi vojaĝis kun mia edzino en 2010 ŝipe el Moskvo al Sankt-Peterburgo kaj renkontiĝis kun Valeria. Surŝipe mi konatiĝis kun peterburgano, kiu nun loĝas en Stokholmo, kaj ŝi kulpas ke mi membriĝis en Fejsbuko.

Dum la pasintaj jaroj samideanoj el Latvio, Kartvelio, Armenio kaj Ukrainio vizitis nin kaj tranoktis ĉe ni. Intertempe nia amiko Mikaelo kelkfoje vizitis nin kaj dufoje koncertis en nia E-kunvenejo Unu-Mondo-Domo en Munkeno, unufoje kun Aĥman kaj Elmira el Dagestano.

P.S. Ekde kelkaj jaroj mi enmetis kelkajn memoraĵojn de mia patro kaj de aliaj fontoj en la reto, plejparte germanlingve:

<http://karlist.net/spez/index_spez.html>.



Bulteno de REU

Nº81

OKTOBRO 2014

finredaktita 01.10.2014

kompilis kaj redaktis N.Gudskov, S.Smetanina, M.Ĉertilov



Rusiaj Esperanto-Tagoj

Pridiskutinte la proponon de Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko pri aranĝo de Rusiaj Esperanto-Tagoj, la Estraro de REU decidis:

Organizi kunlabore kun Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko “Rusiajn Esperanto-Tagojn (RET)” la 14-an – 21-an de julio 2015.

Rusiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia aranĝo de esperantistoj de Rusio. La temo de ĉi-jara aranĝo estas “Multlingva Rusio”.

Rusiaj Esperanto-Tagoj-2015 okazos ekde la 14-a ĝis la 21-a de julio en la bazejo “Surskije Zori” apud la urbo Ĉeboksari. En la programo: kursoj de Esperanto, enkondukaj kursetoj pri la rusa kaj ĉuvaŝa lingvoj, temaj prelegoj, ekskursoj al Kazanĵ, Ĉeboksari, Kozmodemjansk, koncertoj kaj multo alia.

Aliĝkotizo: la unua aliĝperiodo (ĝis la 15-a de januaro) – 500 rubloj; la dua (ĝis la 15-a de marto) – 700 rubloj; la tria (ĝis la 15-a de junio) – 1500 rubloj.

Antaŭ RET estas planata ekskursiva semajno: starto en Sankt-Peterburgo, 3-taga restado en la norda ĉefurbo; komuna veturo al Niĵnij Novgorod, ekskursoj kaj promenoj dum 3 tagoj en Niĵnij Novgorod; karavano al RET-2015. Tempodaŭro de la antaŭ-RET-a programo – ekde la 6-a ĝis la 13-a de julio 2015.

Pliajn detalojn kaj informojn bv. peti ĉe Aleksandr Blinov (RET) <al.blinov@gmail.com> kaj Svetlana Smetanina (la antaŭ-RET-a programo) <svsmetanina@yandex.ru>.

Svetlana Smetanina (Moskvo)

Ĉu vi volas daŭrigi E-someron? Bonvenon al Soĉi! Suda aŭtuno estas milda, la maro ankoraŭ varma, la urbo estas daŭre plena de allogaĵoj, kaj la prezoj estas jam tre moderaj.

La aranĝo konsistos el du ĉefaj flankoj: ekstera informado – ni provos atentigi pri E-o la publikon kaj amaskomunikilojn; movada agado – okazos kunvenoj pri regiona E-agado, aktivulaj kunvenoj, rondaj tabloj kaj seminario pri ekspresa E-instruado.

Enkadre de la aranĝo okazos prezento de novaj E-libroj, vizito al Arbo de Amikeco, orgena koncerto, ekskurso al Olimpika parko (320 ha) kaj aliaj olimpikaj kaj paralimpikaj lokoj.

Paralele kun la aranĝo okazos rapidkurso por soĉianoj kaj gastoj de la urbo.

Estas planate organizi ekspozicion en la Kulturdomo pri “Praktika utiligado de Esperanto”. Viaj ekspoziciaĵoj bonvenas: fotoj, suveniroj, gazetartikoloj k.t.p. pri kontaktoj kun alinacianoj, ĝemelurbaj rilatoj, partopreno en internaciaj aranĝoj ktp.

Ĉiuj gastoj estas petataj informi la organizantojn pri la dato, tempo kaj trafiko de la veno. Ni renkontos vin!

!!! Venantoj unue registriĝu kaj ricevu enloĝigan karton en la Kulturdomo – str. Gorjkogo 85, RDK(Rajonnij Dom kulturny), apud la stacidomo tuj post la busa stacio, kontraŭ policejo, duetaĝa domo. La 31-an de oktobro ekde 08:00 tie deĵoros esperantisto.

Nutrado – memstara. Sed en la klubejo ĉiam pretas samovaro, bakaĵoj, buterpanoj, teo, kafo ktp, kaj en la Kulturdomo funkcias bufedo. La urba manĝejo proksimas je 100 metroj.

La aliĝkotiĝo – 50 rubloj. Dezirantoj povos plilongigi sian restadon ĝis la vintro. Laŭ via plaĉo ni povas ŝangi la programon je via plezuro.

Kontaktoj: rete – <bespalov_sochi@mail.ru>, <laro96@yandex.ru>; telefone – Vladimir Bespalov (hejma 8-862-2-621347, portebla 8-918-005-33-68), Natalija Olejnikova (portebla 8-988-2811846), Tatjana Davidova (hejma 8-862-2623889, portebla 8-918-2034609); poŝta adreso – Esperanto-klubo “Laro”, 354000 Soĉi, str. Gorjkogo 85 (aŭ – Vladimir Bespalov, 354002, Soĉi, Kurortnij prosp. 78/1 – 1).

KAPTU LA MOMENTON! Bonvenon al Soĉi!

LAŬ MATERIALOJ DE LA FORUMO PRI REU ĈE LA SOCIA RETO “VKONTAKTE”

Esperanto-movado en Rusio kaj REU ne devas esti la samo. REU kiel oficiala landa asocio devas unuavice reprezenti Esperanto-movadon por cetera, neesperantista socio kaj la ŝtato. Por tio devas esti certa strategio kaj agado. Tia agado ne eblas sen forta asocio kiel organizaĵo kun jura personeco. Pro tio mi denove memorigas pri tiu ĉi direkto, kiu estas neglektata dum la lastaj kvar jaroj.

Laŭ mi tasko de la Estraro konsistas tute ne en tio, ke “esperantistoj kun plezuro svarmu ĉirkaŭ ĝi”, sed en plifortigo de la asocio mem kiel socia organizaĵo

por ebleco de multflankaj kontaktoj kun aliaj sociaj movadoj kaj ŝtataj instancoj. REU estas unuavice instrumento por atingo de celoj de esperantistoj. Priservado de esperantistoj mem estas grava sed ne ĉefa celo de la asocio. Por organizi klubon, ekspozicion, paĝon en Interreto, Esperanto-renkontiĝon ktp. REU ne estas bezonata. Por tio sufiĉas persona iniciato de esperantistoj mem. Sed alvokoj de apartaj esperantistoj al seriozaj neesperantistaj asocioj aŭ instancoj apenaŭ havos pozitivan efikon. Same malforta nekonata REU havos plorindan rezulton. Do la plej ĉefa tasko de la Estraro en la nuna momento estas sendube plifortigo de la asocio mem, plialtigo de ĝia signifo por plenvalore fari kontaktojn kun aliaj, neesperantistaj sociaj organizaĵoj, kiuj jam havas certajn altajn poziciojn en nia lando, por ne aspekti por eksteruloj kiel fermita sekto, sed aspekti kiel plenvalora socia organizaĵo, kiun atentus amaskomunikiloj, universitatoj ktp.

Krom popularigo de Esperanto REU devas ne forgesi pri egalrajteco de lingvoj, elpaŝi kontraŭ diskriminacio en internacia komunikado. Ja ĝuste Esperanto solvas la problemon. Lige kun tio ni devas sekvi la praktikon de UEA.

Kiel diris Rafael Henrique Zerbetto dum la inaŭguro de UK en Argentino: “Gravas atentigi pri la komunika maljusteco, kiam homoj regantaj la anglan uzas ĝin en internaciaj rondoj, ekskludante tiujn, kiu ne regas ĝin.”

Mi opinias, ke se REU partoprenus en diskutoj kaj agado por defendo de la rusa lingvo kontraŭ troa uzado de anglaj vortoj, kontraŭ ĉiea instruado de infanoj nur pri la angla, kontraŭ anglalingvaj skribaĵoj sur rusiaj ŝoseoj kaj en urboj, kontraŭ altrudo de la angla-usona kulturo, stimulata de rusiaj ŝtataj funkciuloj, do REU montrus sian socian pozicion kaj eblan rimedon kontraŭ lingva diskriminacio. Partoprenante en similaj agadoj kune kun aliaj sociaj organizaĵoj kaj partioj, ni trovus novajn eblecojn por popularigo de esperantistaj ideoj kaj informado pri la lingvo mem. Dum Esperanto-movado estas direktita al si mem, ĝi ne evoluos.

La Kongreso en Bonaero alvokis “ĉiujn subtenantojn de Esperanto fari ĉion eblan por plenumi nian apartan rolon kiel movado por justa, konscia multlingvismo, kaj viciĝi inter la diversaj sociaj movadoj por interkultura kaj kontraŭdiskriminacia edukado, homaj rajtoj, naturprotektado, popola klerigado, rimedoj por vivstiloj kaj aliaj”. Laŭ mi ĝuste tio devas havi prioritaton en agado de REU.

Mi ripetas, ke nun REU estas pli grava kiel instrumento, kiun Esperantomovado devas apliki. Organizado de renkontiĝoj de esperantistoj, diversaj projektoj en la Reto, aranĝoj kiel Lingvaj Festivaloj, ĉio simila sukcese okazas sen REU. Sed Esperanton necesas promocii en la lando sur nivelo de tutlandaj organizaĵoj kaj instancoj. Kun ili necesas dialogi, interŝanĝi informojn, partopreni en komunaj aranĝoj ktp. Agado de esperantistoj devas esti videbla, celoj de esperantistoj devas esti kompreneblaj. Tian agadon povas fari la organizaĵo kiel REU – socia organizaĵo, kiu estas oficiale registrita en la Ministerio de justico de Rusio kaj oficiala Landa Asocio en la strukuro de Universala Esperanto-Asocio. Al tio devas esti direktitaj ĉiuj fortoj de la estonta Estraro de REU. Kaj unuavice tiuj fortoj devas esti direktitaj al ordigo de la administra flanko kaj akiro de necesaj atributoj de socia organizaĵo havanta juran personecon, kiuj estis perditaj antaŭe.

Mikaelo Ĉertilov (Niĵnij-Novgoroda reg.)

Estimata Rusia Esperantista Unio (REU),

En decembro 1954, en sia Ĝenerala Konferenco en Montevideo, Unesko akceptis la faman rezolucion, per kiu ĝi agnoskis la kontribuojn de Esperanto al ĝiaj agadkampoj (edukado, scienco kaj kulturo). UEA nun alvokas al komuna festado de la Jaro “Montevideo 60”, por marki tiun signifan datrevenon kaj por elstarigi la rimarkindan progreson de la lingvo sur tiuj kampoj en la lastaj 60 jaroj. Ni antaŭvidas, ke tra la jaro okazos diversaj projektoj kaj eventoj kun aparta atento al la eduka, scienca kaj kultura valoroj de Esperanto. Temas iusence pri tutmonda kultur-festivalo kiu disvolviĝos en multaj diversaj formoj kaj lokoj.

Kiel via propra asocio povos kontribui al tiu ĉi unika evento? Nu, unuavice, per retrorigardo al la pintaj atingoj de la lastaj jardekoj sur via faka tereno aŭ en via lando. Pensu ekzemple pri kontribuoj al la originala kaj tradukita E-literaturo, pri alispeca kultura kaj scienca agado, pri elstaraj instruistoj kaj kursoj, pri la uzado de Esperanto sur novaj terenoj, pri la rolo de la amaskomunikiloj (radioj, podkastojs), pri la Interreto. Kiel vi povus resumi tiujn ses jardekojn por la novaj generacioj, kiuj ne travivis ilin? Kiuj laŭ vi estas la plej notindaj kaj neforgesendaj atingajfoj de tiu periodo? Kiel teni ilin vivantaj kaj alireblaj por la nuntempo?

Due, kiajn aranĝojn vi povas antaŭvidi por la Montevideo-jaro, kies kulmino estos sendube la 100-a Universala Kongreso en Lillo, sed kiu povos ampleksi pliajn eventojn kaj projektojn ĝis la fino de la jaro 2015? Ĉu eblas marki la Jaron per speciala seminario, kultura programo, kurso aŭ preleg(ar)o, aŭ per eldono de artikoloserio, retpaĝaro, libro aŭ podkasto? Ĉu eblus kunmeti intervjuojn pri la lastaj 60 jaroj kun esperantistaj veteranoj kaj aktualaj gvidantoj?

La Jaro servu por konsciigi/klerigi membrojn de la E-komunumo pri niaj tradicioj kaj atingoj, por stimuli la organizadon de novtipaj aranĝoj kaj projektoj kaj por montri tiujn atingojn al neesperantista publiko, aparte informante kaj invitante Unesko-respondeculojn al la koncernaj eventoj. La informoj disvastiĝu ne nur en E-revuoj, sed ankaŭ ĉe televidkanaloj, radiostacioj kaj retradioj – ne sole E-lingvaj. Por kontribui al la realigo kaj kunordigo de la Jaro, ni petas, ke via asocio ĝis la mezo de oktobro elektu respondeculon kaj anoncu tiun al ni. Ni antaŭvidas, ke el la reciproka informado kaj kunplanado de aktivuloj el la tuta mondo la Jaro povos ludi unikan rolon en nia kultura evoluo. Tiu procezo jam nun komenciĝas, do ni petas vin senprokraste elekti vian propran reprezentanton en tiu procezo.

Aparta artikolo kun pliaj detaloj pri la Jaro “Montevideo 60” aperas en la oktobra numero de la revuo “Esperanto”.

Atendante vian baldaŭan reagon kore vin salutas,

Mark Fettes, Prezidanto de UEA

Barbara Pietrzak, UEA-estrarano pri la Jaro “Montevideo 60”

Responde al la proponoj de la letero la Estraro de REU decidis komisi la kunordigon de la porokazaj aranĝoj al speciala respondeculo, nun serĉata. (Sin)proponoj bonvenas.

Entute 238 membroj, i.a. 36 REJM-anoj.

Dumvivaj membroj – 57

Mecenatoj

Kitajkin Ivan (Mordovio, Turgenevo, Ardatovskij rajon)
Kovaljova Valentina (Novosibirsk)
Loŝmanov Anton (Komsomoljsk-na-Amure)
Molčanov Aleksej (Saĥalina reg., Troickoje)
Odincov Aleksej (Permj)
Rusanov Viktor (Saratov)

Grandan dankon al ĉiuj mecenatoj!

Individuaj membroj

Arbekova Jekaterina (Novosibirsk)
Belickij Sergej (Primorskij reg.)
Blinov Aleksandr (Ĉuvaŝio, Ĉeboksari)
Chengcheng Shan (Ĉinio)
Ĉupin Bronislav (Udmurtio, Ijevsk)
Gnusarev Ilja (Penza reg., Ĉemodanovka)
Ivanov Vjaĉeslav (Sankt-Peterburg)
Kandalinskij Viktor (Leningrada reg., Tiĥvin)
Kondratjev Boris (Sankt-Peterburg)
Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg)
Kuznecov Sergej (Jekaterinburg)
Maliŝeva Jekaterina (Sankt-Peterburg)
Milner Aleksandr (Moskvo)
Minin Vladimir (Tomsĥ)
Opletajev Vladimir (Tjumen reg., Surgut)
Rezniĉenko Aleksandr (Krasnodara reg., Gorjaĉij Kljuĉ)
Roĵdestvenskij Vjaĉeslav (Ĉeljabinsk)
Sapogov Ivan (Moskva reg., Mitiŝĉi)
Smetanina Svetlana (Moskvo)
Strelec Sergej (Ĉeljabinsk)
Sudakova Alina (Penza reg., Ĉemodanovka)

Familiaj membroj

Mironova Irina (Moskvo)

Aliĝintaj kolektivoj (14 grupoj kun 149 aligitaj membroj)

EK “Arĝenta flamo” (Jekaterinburg) – 10 membroj
Jeleca EK “Esperanto” – 7 membroj
Krasnodara E-klubo – 17 membroj
Moskva Esperanto-Asocio “MASI” – 18 membroj

La 25-an de septembro 2014 Dmitrij Vlasov sukcese defendis doktoran disertacion kun la temo “Ĵurnalismo de Esperantomovado en la 20-a jarcento: tendencoj de evoluo kaj tipologiaj specialaĵoj”. Ĉijare la eldonejo “Impeto” eldonis lian monografion, kiu estas bazita sur lia disertacio:
<http://lernolibro.ru/istorija_esperanto_vlasov>.

<reu-agado>

EK “Murmano” (Murmansk) – 13 membroj
 Novoĉ-EK (Novoĉerkassk) – 8 membroj
 Samara E-organizo – 10 membroj
 Societo “Espero” (Sankt-Peterburg) – 11 membroj
 EK “Laro” (Soĉi) – 16 membroj
 Tiĥvina Esperanto-klubo – 7 membroj
 Tjumenaj Esperanto-klubo “Revo” – 10 membroj
 E-klubo “Pacifiko” (Vladivostok) – 12 membroj
 Volgodonska E-grupo “Stipo” – 5 membroj
 Volgograda EK “Espero” – 5 membroj

FORPASI ANNA BUTKEVIĈ



13.08.2014 estingiĝis la stelo de Anna Butkeviĉ – gvidantino de Sankt-Peterburga societo “Espero”.

Ŝi estis unu el la plej energiaj rusiaj esperantistoj de lastaj jardekoj, motoro de nia movado en Sankt-Peterburgo. Dank al ŝi multaj peterburganoj ne nur sciis pri E-o, sed ankaŭ studis en kursoj de ŝi organizitaj. Kiel sciante, ne eraras nur tiu, kiu ne laboras!..

Ŝi multege laboris por la Movado, kaj oni konis ŝin en multaj landoj – de Kanado ĝis Aŭstralio. Plurfoje ŝi vizitis sian amatan Japanion... Ŝi bone posedis la polan lingvon. Ŝi ĉiam estis senlaca inventi ion novan!

Mi memoras ŝin en rusa nacia kostumo brile staranta sur la podio de UK en Japanio dum la so-

lena fermo...

Ŝi scipovis konvinke paroli pri E-o kaj kun simplaj peterburganoj, kaj kun la urbaj instancoj. Mi memoras kiel ŝi influis iun vican oficistinon en Sankt-Peterburga administracio pri neceso kaj utilo aranĝi en la urbo Russian E-Kongreson (REK) kun internacia partopreno: “en la mondo estas kelkcent milionoj da esperantistoj, Majkl Ĝekson estis ankaŭ esperantisto”, ktp. ... La oficialulino estis jam “nia” kaj tiu REK estis sufiĉe impona! Tiajn fantaziojn la malamikoj nomus mensogoj, sed la realistoj nomus “sukcesa PR”!

Eble ŝi ne estis ideala scipopvanto de E-o, sed ŝi tute certe estis brila movadano, kiu bone prezentis la lingvon kaj movadon al la ĉirkaŭanta mondo.

Anna naskiĝis en 1958, do, aĝis nur 56 jarojn... nekuracebla kancero.

Fortojn al ŝia edzo Andreo Potapov travivi la forpason de Anjo! Por li ŝi ankoraŭ longe estos en oficvojaĝo...

La cindro de Anna Petrovna Butkeviĉ estis lokita en peterburga tombejo en la 40-a tago de post la morto. La cindro de Anna Petrovna Butkeviĉ estis enterigita en ŝia naskiĝloko, en Belorusio.

Valentin Seguru (Moskvo)



Andrzej Grzębowski (1942-2014) mortis subite la 1-an de aŭgusto en Bonaero, kie li partoprenis en la 99-a UK, aktive kontribuante al diversaj diskutoj. Magistro pri historio, li estis lektoro pri Eo en la Universitato Nikolao Kopernik en Toruń dum 1966-1975. Junaĝe li aktivis en Pola E-Junularo, i.a. kiel prezidanto dum 1967-1970, kaj estis komitatano de TEJO dum 1964-1968 kaj vicprezidanto dum 1968-1970; li estis ankaŭ prezidanto de STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo).

En la monda movado li precipe famiĝis kiel energia kaj ideoriĉa organizanto de turismo. Li estis prezidanto de la asocio Monda Turismo de 1973 ĝis ĝia malfondo en 2003. De 1983 ĝis 1993 li estis direktoro de la Buroo de E-Turismo “Esperantotur”, organizante amason da ekskursoj al ĉiuj mondopartoj kaj al E-renkontiĝoj, i.a. UK-oj. En 1991 Grzębowski fondis en Bydgoszcz la altlernejon Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK), kiu fariĝis filio de AIS. Li mem estis adjunkto de AIS. ISTK estis la unua altlernejo en la mondo, kie oni instruis plene en Esperanto.

Li fondis kaj gvidis ankaŭ Internacian Centron pri Turismo kaj Kulturo (1998) kaj la Internacian Klubon “Esperantotur” (2002). Prezidanto de la Filio de Pola E-Asocio (PEA) en Bydgoszcz li estis dum 1972-1993. Li estis ankaŭ ano de la Ĉefa Estraro de PEA. Li membriĝis en UEA en 1961 kaj estis ĝia komitatano dum 1973-2004. En 2011 UEA distingis lin per Diplomo pri Elstara Agado.

PEA elektis lin sia honora membro.

Li plurfoje vizitis nian landon kaj estis bona amiko de sovetiaj kaj rusiaj esperantistoj.

laŭ “Esperanto” de UEA 1284 (10), oktobro 2014



La 20-an de oktobro en Naro-Fominsk forpasis Vladimir Pavlovič Masalkin (1956-2014), konata uzbeckia E-aktivulo, diplomita lingvo-instruisto, dum lastaj du jardekoj loĝinta en Moskvo kaj Apudmoskvo. Siatempe li estis sekretario de Taŝkenta E-klubo kaj de SEJT-23 en Sukok. Dum multaj jaroj li okupiĝis pri tradukoj de ruslingvaj versaĵoj en Esperanton. Li tradukis verkojn de B.Pasternak, M.Cvetajeva, A.Aĥmatova, A.Kočetkov, J.Levitanskij, S.Jesenin, N.Dorizo, I.Thorĵevskij, N.Turbina ka.

Eksciu, ke...

LOMI GASTIGAS...

Ekde la 8-a ĝis la 10-a de aŭgusto okazis poranima festo por multaj ŝatantoj de



barda kanto. Apud la vilaĝeto Lomi (Uljanovska regiono) oni povis vidi konatajn bardojn, aŭskulti bonajn kantojn kaj simple gitarludantojn. Por okazigi semajnfinojn kune kun siaj geamikoj kunvenis preskaŭ 5 000 homoj el Uljanovska regiono, Moskvo, Peterburgo, Samara, Toljatti, Kazanĵ, Saratov, Niĵnij Novgorod, Sizranĵ, Ĉeljabinsk.

Kelkaj el ili aperis sur arbarkampo ĉe negranda artefarita lageto, kiun formis akvofontoj, jam longe antaŭ oficiala malfermo de la festo. Kun infanoj kaj hejmaj bestoj, kun tendoj kaj dormosakoj, per aŭtoj kaj perpiede... Ne mankis eĉ bicikloj, iufoje kunprenitaj en aŭtoj, ĉar bicikle oni povis ĉirkaŭveturi la lageton laŭ la bordo.

Nia esperantista tendaro sub gvido de la kluba prezidanto estis sufiĉe granda: ok tendoj komforte situis sub grandegaj arboj, ĉefe koniferoj. Certe estis eĉ placeto por E-lecionoj kaj E-kantado. Irina Grebeŝĉenko kaj Jurij Karcev prizorgis tion.

La feston vizitis nia guberniestro, kiu varme salutis la bardan festivalon, donacis al ĝi novan gitaron (jam tradicie) kaj regalis la ĉeestantojn per senpagaj glaciaĵoj. Verŝajne pro tio la organizantoj scias la nombron de la festivalanoj. Tamen manĝi la malvarman dolĉaĵon dum tiu varmege tre agrablis.

Dumtage oni povis vagabondi de tendo al tendo, aŭskulti kantojn kaj kunkanti,



se oni sciis la tekstojn, aŭ zumi melodiojn, se la tekstoj estis ankoraŭ nekonataj.

Posttagmeze komenciĝis koncertoj sur tri scenejoj. Oni pendigis tagordojn, kaj certe ni povis elekti. Kiom da konataj aŭ ŝatataj nomoj: Jekaterina Boldireva, Julija Ziganshina, Irina Surina, Lev kaj Ksenija Kuznecov-oj, Aleksandr kaj Natalija Do-



dosov-oj, infana kantgrupo “Vitaminki” (“Vitaminetoj”) kaj certe “Baumana, 33”, plenumantoj el Dimitrovgrad (A.Artamonov, S.Zimin, A.Ĥrustaljov)! Tiu ensemble gastis kelkfoje ĉe uljanovskaj esperantistoj dum E-aranĝoj aŭ lingvaj festivaloj. Ankaŭ la klubanoj vizitas iufoje iliajn koncertojn en Dimitrovgrad. En tiuj kazoj Saŝa Ĥrustaljov aŭ la tuta trio nepre kantas ion esperantligve kaj diras kelkajn vortojn pri la lingvo mem.

Krome ni partoprenis kvizon pri Plastov fare de Irina Obuĥova, la ĉefino de Plastov-muzeo, kun kiu la E-klubo jam delonge kunlaboras, kaj ricevis premiojn, bone pripensitajn de ŝi. Tio estis invitoj por la sekva jaŭda muzea aranĝo en formo de alumentujo (tre grava aĵo por tendaranoj) aŭ bombonoj (pli grava aĵo por infanoj, kiuj ankaŭ partoprenis la interesan kvizon, gvidataj de siaj gepatroj aŭ geavoj).

Vespere, sidante ĉe lignofajro, oni ĝuis rebrilojn de la flamo kaj revis, revis, revis, rigardante senfinan ĉielon stelan. Kaj certe kantis.

La festivalo sukcesis. Pri tio ni povas juĝi dank’ al vortoj de la guberniestro. Li proponis organizi similan feston vintre en unu el la plej famaj urbaj haloj. Kaj por ni, simple ripozantoj dum lastaj someraj tagoj, tiu festo iĝis granda plezuro por ekkoni ion novan en barda movado, renkontiĝi kun geamikoj, jam delonge ne viditaj, ĝui freŝan arbaran aeron kaj sunan veteron (interalie, en la urbo samtempe pluvegis kaj eĉ hajlis).

Do, aliĝu sekvan aŭgustan festivalon kaj venu al Lomi! Kantoj kaj geamikoj atendos ĉiujn.

Margarita Karceva (Uljanovsk)

MEMBROSTATISTIKO DE UAE JE LA 1-a DE SEPTEMBRO

La membronombro daŭre oscilas ĉirkaŭ la nombro je la sama dato en 2013: la 1-an de junio ĝi estis 9 membrojn malpli, la 1-an de julio – 21 membrojn pli kaj la 1-an de septembro – denove 10 membrojn malpli. La tuta membraro je la 1-a de

septembro estis 4782. Mankas ankoraŭ 121 ĝis atingo de la fina nombro en 2013 (4903). Kun la ĝisnuna ritmo tiu nombro estas atingebla, sed por atingi 5000 ĉi-jare la ritmo devos plivigliĝi.

Laŭkategorie la nombroj estis (interkrampe komparo kun la 1-a de septembro 2013): Membro kun Gvidlibro 397 (+47), juna MG 37 (+14), Membro kun Jarlibro 1219 (-33), juna MJ 233 (+35), Membro-Abonanto 1844 (-103), juna MA 73 (+4), Dumviva Membro 772 (-3), juna DM 14 (+1), DM kun Jarlibro 127 (+28), juna DMJ 15 (+1), Honora Membro 45 (-1), Honora Patrono 6 (sama).

Estus pli da membroj, se Fondaĵo Canuto povus pagi same multe da kotizoj kiel pasintjare. Je la 1-a de septembro estis 701 “kanutanoj” sed antaŭ unu jaro – 739 (jarfine 744). Nun la fondaĵo ne havas monon por pli da kotizoj, sed ĝi havas deficiton 1500 eŭroj. Laŭ la kutima ritmo de donacoj la defcito malaperos ĝis la jarfino, sed por ke la fondaĵo povu fari pli da membrigoj ankoraŭ ĉi-jare, necesos pli da donacoj. Plej rapide ĝi povos kreskigi la membraron pagante kotizojn MG kaj MJ(T), sed kompreneble en iuj individuaj kazoj eblos ankaŭ MA(T).

Mi do alvokas donaci al Fondaĵo Canuto!

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

NELINGVA FESTIVALO



Kial ne viziti hipodromon dum ĉevala jaro?! Tute ne eblas! Des pli ke estis bona ebleco: la 2-an – 3-an de aŭgusto en Uljanovsk startis festivalo “Orlov-trotĉevalo”. Tio iĝis ankaŭ kaŭzo por lerni novajn vortojn en Esperanto. Komenco jam estis dum la novjara festo, kiam E-klubanoj partoprenis esperantlingvan

kvizon pri ĉevaloj, prezentitan de M.Karceva. Tiam venkis Tatjana Kuzjmina (Uljanovsk) kaj Tatjana Iljutkina (Dimitrovgrad). Aliuloj ne multe sciis pri ĉevaloj, kvankam Sergio Abramov iam aktoris en Krimeo, ludante en teatraĵeto laŭ rakonto de A.P.Ĉeĥov “Ĉevala familinomo”.

Do, ni decidis ekscii pli. Estis varmega vetero, kaj stari ĉe barilo de vetkura voĵeto en ombro, kiun ĵetis hipodroma konstruaĵo kun sidlokoj por spektantoj, estis tre agrable. La programon komencis diversaj ensembloj, kiuj plenumis popolajn kantojn. Samtempe ni povis observi partoprenantojn de la festivalo – ĉevalojn, ra-

jdantojn kaj ĵokeojn, kiuj jam trejnis sin. Ni provis diveni, kiu povus venki dum ĉevalkurado. Apude starantaj kompetentuloj klarigis al ni kelkajn nuncojn de la ĉevala sporto. Ni eksciis ekzemple, ke la vortoj “наездник” kaj “жокей” ne estas plenaj sinonimoj en la rusa lingvo. La dua ulo sidas sur ĉevalo, kaj la unua sidas en ĉareton nomatan ruse «качалка»



(balancfotelo). Ni dume ne trovis precizan diferencon en Esperanto. En Vikipedio oni klarigas: “Ekzistas kelkaj tipoj da tiaj vetkuroj. Unu estas trotado por ĉevaloj, kiuj atingas altan rapidecon en tiu marŝmaniero. Povas esti trotado kun rajdanta ĵokeo aŭ trotado, kie la ĉevalo tiras ĉareton. En PIV (1987) estas klarigoj: ĵokeo estas “homo, kies metio estas rajdi en ĉevalaj vetkuroj”; rajdanto estas “homo, kiu rajdas”. Do, verŝajne, uzendas la vortoj ĵokeo (=наездник) kaj rajdanta ĵokeo (=жокей). Kion diros Esperanto-spertuloj?”

Krome, oni rakontis al ni pri nia hipodromo, kiu ekzistis jam ekde 1853 kaj poste nur translokiĝis.

Intertempe sur la provizora scenejo aperis nia guberniestro, kiu salutis la ĉeestantojn kaj informis pri estonteco de nia hipodromo, kiu estis inaŭgurita apud la pitoreska parko “Pobeda” (“Venko”) en 1948. Laŭ liaj vortoj la ĉevalkurejo, pli granda kaj moderna, iĝos turisma allogaĵo. Al li kaj al aliaj honoraj gastoj de la festivalo oni alkondukis la plej junan kaj la plej maljunan ĉevalojn, kaj ili (la gastoj) nutris la bestojn per pomoj kaj karotoj. Kaj poste... Poste komenciĝis ĉevalkurado. La unuan fojon kelkaj el ni ekvidis aŭtostarton. Dum la unua vetkuro ni povus malgajni (se ekzistus vetludo), ĉar la elektita de ni ĉevalo en **verda** brustumo (sed sen verda stelo, bedaŭrinde) galopis anstataŭ troti, kaj la sportaj juĝistoj ne permesis al la ĵokeo daŭrigi la vetkuron. Tamen la dua ĉevalo – Glacimonto – (pro ĝia nomo ĝi estis elektita de ni dum tiu varmego) sukcesis! Glacimonto brile rondkuris kaj atingis finlinion kiel la unua. La venkinto, ufano, ricevis sportan trofeon – pokalon. Ni esperas, ke ankaŭ al la ĉevalo oni donis ian “premion” (poman, karotan, sukeran aŭ panan).

Ĉar la varmego pliiĝis, kaj specialaj aŭtoj por priverŝo de la vetkura vojeto tute al ni ne helpis (ni revis eĉ pri tia freŝeco), ni decidis lasi la vetkurejon, des pli ke proksimiĝis la fino de la festo, kiu dum tiuj du tagoj plaĉis al nia kvaropo: Oljga kaj Jelena Sirotinina, Tatjana Kuzjmina kaj

Margarita Karceva (Uljanovsk)



OLEG ILJIĈ KRASNIKOV (1937-2014)

La 16-an de junio 2014 post mallonga (pli ĝuste – dusemajna) malsano en Kirova malsanulejo forpasis Oleg Iljiĉ Krasnikov.

Oleg Krasnikov naskiĝis la 11-an de junio 1937. Unue li lernis Esperanton en 1955 estante studento de la Urala Politeknika Instituto en Sverdlovsk (nun Jekaterinburg), sed ekposedis ĝin nur en 1970.

En la civitana vivo Oleg Krasnikov laboris kiel elektristo-mekanikisto en la industriaj trustoj, poste – kiel inĝeniero en projekta instituto de “Kirovpromstroj-projekt”.

Laŭ decido de la Kirova komitato de Kom-somolo de la 11 novembro 1980 oni fondis E-klubon, kaj Oleg Krasnikov estis nomumita ĝia gvidanto. Krasnikov estris la klubon de 1980 ĝis 1983. En la 1980-aj jaroj li instruis Esperanton en la E-klubo “Antaŭen”. O.Krasnikov estas aŭtoro de multaj priesperantaj artikoloj en la regiona gazetaro. En 1981 grupo de kirovaj esperantistoj ĉekape kun Krasnikov partoprenis en arkeologiaj fosadoj en Debnevo (Bulgario) kadre de Junulara E-Laborista Brigado Arkeologia (JELBA); pro la aktiva partopreno la gvidanto ricevis Honoran Diplomon de Bulgara Esperantista Asocio.

O.Krasnikov abunde korespondis kun la samideanoj el 21 urboj de tiama Sovetio: Smolensk, Niĵnevartovsk, Krasnojarsk, Magadan, Jelec, Rostov-Don, Odeso, Tallinn, Ufa, Poltavo, Moskvo, Permĵ, Siktivkar, Krasnodar, Tiĥvin, Jurbarkas, Brest, Bijsk, Odincovo, Tjumenj, Leningrad kaj el 19 landoj de la mondo. Impresas la koresponda listo: Francio, GDR, Hispanio, Usono, Ĉeĥoslovakio, Brazilo, Jugoslavio, Anglio, Nederlando, Ĉinio, Bulgario, Hungario, Svedio, Kanado, Svislando, Belgio, Italio, Finnlando, Pollando.

Oleg Krasnikov kun Detlev Blanke estas aŭtoroj de la ruslingva historia verko “Esperanto-movado: fragmentoj de la historio” (Moskvo, 2008). Surbaze de multjaraj esploroj Krasnikov verkis parton de “Historio de Sovetrespublikara Esperantista Unio”.

O.Krasnikov ankaŭ estas kunaŭtoro de la kolektiva ruslingva verko “Esperanto-movado en nord-okcidento de la eŭropa parto de Rusio” (Peterburgo, 2014). Al la plumo de Krasnikov apartenas historio de E-agado en la urbo Kirov (eksa Vjatka) en la 1920-30-aj jaroj, ankaŭ – de E-movado de la E-ĉeloj en Jaransko, Sovetsko, Omutninsko.

Valentina, la vidvino de Oleg Krasnikov, petas E-organizaĵojn ne plu sendi esperantaĵojn laŭ la adreso de Oleg. Laŭ la deziro de la mortinto liaj E-arkivo kaj E-biblioteko estis donacitaj al peterburgaj esperantistoj.

Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburg)


ESPERANTO-VIKIPEDIO: JAM 200.000 ARTIKOLOJ

En aŭgusto la vikipedio-eldono en la internacia lingvo Esperanto atingis la nombron 200.000 artikoloj. Esperanto per tio okupas la 33-an lokon inter la unuopaj lingversioj de la Vikipedio. (Por komparo: La slovaka versio havas proks. 194.000 artikolojn, la dana proks. 190.000.)

La Esperanto-Vikipedio estas ofte uzata enciklopedio de la Esperanto-parolantoj, kiuj nuntempe troviĝas en pli ol 120 landoj tutmonde; speciale por lernantoj kaj studentoj ofertiĝas alloga reto de kontaktoj. Oni taksas, ke pluraj centmiloj da homoj regule parolas Esperanton, kelkaj milionoj supozeble lernis Esperanton. En kelkaj lastatempe okazis rimarkinda kresko, ekzemple en Hungario, kie la ŝtata censo por la du pasintaj jardekoj konstatis kvarobliĝon de la nombro de Esperanto-parolantoj – en 1990 oni kalkulis 2083 Esperanto-parolantojn, por 2011 rezultis 8397 Esperanto-parolantoj, por 1985 el ili Esperanto estas familia aŭ denaska lingvo.

Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio)

LA CENTRA OFICEJO INVITAS AL LA 41-a MALFERMA TAGO



La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas jam por la 41-a fojo al la Malferma Tago, ĉi-foje sabaton, la 29-an de novembro. Unuafoje la Malferma Tago okazis 20 jarojn pli frue, en novembro 1994, kaj tiel plaĉis al la vizitantoj, ke ĝi fariĝis komenco de regula aranĝo, okazanta dufoje ĉiujare.

En la 41-a Malferma Tago oni aŭdos tri prelegantojn. La fama movada ĵurnalistino, organizanto kaj entreprenisto László Szilvási traktos du temojn. Sub la titolo “Ĉu asocioj bezonas membrojn?” li parolos pri la nuna stato kaj perspektivoj de neprofitcelaj kaj neregistritaj organizaĵoj en la interreta epoko. En sia dua prelego li analizos spertojn kaj problemojn de la amasa instruado de Esperanto en Hungario. La Ĝenerala Sekretario de UEA Barbara Pietrzak prezentos la kampanjon “Montevideo 60”, al kiu UEA invitas la esperantistojn por marki per mulflanka agado la 60-an datrevenon de la Esperanto-rezolucio akceptita de Unesko en 1954. Inĝeniero Toon Witkam, kiu siatempe iniciatis la pioniran projekton Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT) de la nederlanda firmao BSO, prelegos pri la historio kaj disvolviĝo de aŭtomata tradukado.

Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj kaj de filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazon de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

kultúra revuo

Belarta
rikolto

2014

Premiaĵoj venintoj de la
Belartaj Konkursoj
de Universitato Esperanto-Asocio

por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2015. Nur se reta sendo ne eblas, oni sendu unu paperan ekzempleron al: *Belartaj Konkursoj de UEA, sekretario Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italia.*

Por la Branĉo *Infanlibro* oni sendu tri ekzemplerojn de la koncerna libro al: *Ionel Onet, Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*, kun la indiko “Por Belartaj Konkursoj” kaj unu al la adreso de la sekretario.

Premioj: unua premio € 260, dua premio € 182, tria premio € 104, Nova Talento € 182; *Infanlibro* de la Jaro € 546.

Detala regularo haveblas ĉe UEA kaj legeblas ankaŭ rete.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH UNUAFOJE SUBVENCII

La fondaĵo “Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich”, kiun UEA povis starigi ĉi-jare per donaco de la gefiloj de ges-roj Bachrich, disdonis 1 500 eŭrojn kiel siajn unuajn subvenciojn. Ĉiuj sep petintoj ricevis subvencion, kiun la Libroservo de UEA sendos kiel librojn aŭ aliajn eldonaĵojn laŭ la dezirlistoj, kiujn la petintoj sendis.

Subvencion ricevis Esperanto-biblioteko en Ŝimonoseki (€ 363), Bonaera Esperanto-Asocio (€ 258), Interkultura Centro Herzberg (€ 237), Unuiĝo Togolanda por Esperanto (€ 229), Reinhard Haupenthal (€ 206), Triesta Esperanto-Asocio (€ 130), Kulturdomo de Esperanto en Grésillon (€ 77).

Biblioteka Apogo Bachrich daŭrigas la tradicion de la iama Biblioteka Apogo Thorsen, kies bonhавон donacis ges-roj Roma kaj Poul Thorsen kaj kiu helpis pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj ekde 1997 ĝis 2011. Post unu jaro sekvos la dua aljuĝo de subvencioj de la nova fondaĵo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

SAMARKANDO EN ĈIUJ KONTINENTOJ

Ионесов А.И., Ионесов В.И. Малая энциклопедия зарубежной Самаркандианы: Культура, объединяющая мир = A Concise Encyclopedia of Foreign Samarkandiana: Culture Linking the World [Текст на русском с резюме на английском, испанском, итальянском, немецком, португальском, узбекском, французском, эсперанто и японском языках]: Научно-информационное издание. (Самаркандский общественный Музей мира и солидарности; Самарское культурологическое общество «Артефакт – культурное разнообразие»; Самарская государственная академия культуры и искусств). – Самара–Самарканд: ВЕК#21, 2014. – 387 с.





En Samarkando (Uzbekio) kaj Samara (Rusio) estis solene lanĉita la nova libro “Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo Unuiganta la Mondon” aperinta ĉe la samara eldonejo “Bek#21”. La enciklopedieton aŭtoris esperantistoj – fondinto de Samarkanda Pacmuzeo Anatoli Ionesov kaj profesoro de Samara Ŝtata Akademio de Kulturo kaj Artoj d-ro Vladimir Ionesov.

En la libro estas unuafaje prezentitaj kaj sistemigitaj diversspecaj materialoj pri la kultura reprezento de Samarkando – unu el la plej antikvaj urboj de la mondo, enlistigita de Unesko kiel Monda Heredaĵo – en la komunika spaco de nuntempo. La publikaĵo enhavas plej kompletajn informojn pri la objektoj de la eksterlanda “Samarkandiana”, enstampiĝintaj interalie en personaj kaj familiaj nomoj de homoj, nomoj kaj historioj de loĝlokoj, stratoj, hoteloj, restoracioj, kafejoj, vendejoj, firmaoj, konsumvaroj, artaj verkoj ktp.

Estas montrata la ĉeesto de la kultura tradicio de Samarkando en la kreiva praktiko kaj popola diplomatio de la internacia komunumo. Estas listigitaj unikaj materialoj, atestantaj pri la influo de la eterna figuro de Samarkando al la arta kreivemo kaj profesia agado de homoj el diversaj landoj, kulturoj kaj profesioj. Estas pritraktataj specimenoj de multkultura kreiveco, ligitaj per sia apero kun Samarkando, inkluzive de pentraĵoj, kantoj, muzikaj komponaĵoj, literaturaj verkoj, televidaj kaj radiaj elsendoj, filmoj, teatraĵoj...

La libro dokumentas ĉion, kio estas ligita kun la nomo “Samarkand” kaj prezentas ampleksan kolekton de objektoj de “Samarkandiana” el diversaj anguloj de la terglobo. La publikaĵo enhavas ankaŭ informojn pri konataj eksterlandanoj, naskiĝintaj aŭ iam loĝintaj en Samarkando.

La libro, proponata al via atento, estas la unua ĉi-speca eldonaĵo pri la komparaj-kulturaj reprezentoj de la mondfama “urba marko” Samarkando, akiranta en malsamaj sociaj, ekonomiaj kaj artaj tradicioj sian modernan sonon.

La volumo aperas kontribue al la programo de interkultura kunlaboro kaj partnereco inter ĝemelurboj, Samarkando (Respubliko Uzbekio) kaj Samara (Rusia Federacio), kaj honore al la proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj Internacia Jardeko por Proksimigo de Kulturoj (2013-2022) kaj la Jaro de Kulturo en Rusia Federacio.

Menciindas, ke la aŭtoroj speciale substrekis la gravan rolon de Esperanto en realigo de la projekto “Samarkandiano”. Sufiĉas diri, ke mencioj de Esperanto kaj esperantistoj aperas en tiu ĉi ruslingva 387-paĝa libro pli ol 60-foje. Ankaŭ enestas unupaĝa esperantlingva resumo aldone al tiuj en la angla, franca, germana, hispana, itala, japana, portugala, rusa kaj uzbeka lingvoj.

La libro mendeblas ĉe la samara eldonejo “Bek#21”: <vek-21@mail.ru>, <cissime@yandex.ru>; tel. +7 (846) 207 41 11.

Anatoli Ionesov (Uzbekio)

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalĵ)

VERSAJ IMPRESOJ PRI TEMoj EN TIĤVIN

Mi estas plej kore dankema al ĉiu, kiu donacis al mi TEMojn, ja dum ĝiaj ok tagoj – ne en Bonaero, ne eksterlande, tamen inter esperantistoj! – mi estis vere feliĉa! Mi havis multe da impresoj, kaj pri iuj el ili mi verkis ĉi-subajn versaĵojn.

Miaj TEMoj

Duafoje mi estis ĉi tie,
Sub la verda tiĥvina stel',
Kiu min bonvenigis radie
De ridetoj kaj kora hel'.

Kuris for la korprema amaro,
Ĝin forpelis l' amika vort',
Kaj la ĝoj' ĉe esperantistaro
Iĝis ree donac' de l' sort'.

Vokis kantoj, prelegoj, tradukoj –
Nek enuo, nek teda lac'.
Brilsomeraj aromoj kaj sukoj
Reagordis al festa pac'.



Belaj voĉo, humoro, vizaĝo –
La invit' al la danka plum'!
Kial tamen tuj venas kuraĝo
Ĉe la verda nurlingva lum'?!

Sen la ardaj konvinkoj-insistoj
Mi ripetu ne por envi':
Ĉe Tiĥvino al esperantistoj
Estas bone – mi ĵuras al vi!



Koncerto de Andreo Korobejnikov

(sonis la fantazio “Vagabondo” de Schubert, “Apassionata” de Betoveno kaj
“Bildetoj el ekspozicio” de Musorgskij)

Vojoj-padoj de vagabondo.
Suferado de Betoven’.
Laŭ la viv’, laŭ la temp’, laŭ l’ mondo
Akompanas dolor’ kaj pen’.

Kial kor’ je ĝoj’ plenigata
Levas alten al gracia hel’?
“Vagabond’”, “Apassionata” –
Homaj sentoj en sia bel’.

Kial sorĉas je malavaro
Kaj varmego de l’ emoci’
Gnomo, brutoj, promen’, bazaro
El iama ekspozici’?

L’ ordinara, gaja, korprema
Iĝas alta, vokante sor
En la arto revivigema
De l’ mirinde talenta kor’.



Anna Striganova. Miraklo de unu momento

Miraklo de unu momento
Donacas al hom' foje sin
En tondro, kantet' aŭ silento
Je graco de la ilumin'.

Kaj ĉio kutima surtere
En sia konsumo torent'
Alvoke ekbrilas mistere
En tiu mirinda moment'.

Ĉu venas ĝi tute hazarde
Al hom' en fabel' kaj real'?
Ĉu kaptas ĝin iu tro tarde,
Se jam ruinigis la fal'?

Al iu alia ĝi tute
Ne flamis je l' sava magi'.
Ĉu vivu li plu persekute
De la malamika medi'?

Miraklo de unu momento,
Lumigu profundojn de l' kor',
Ke venu donace la sento
De bono kaj ĝia favor',

De amo, esper' aŭ admiro
En sparko de sorĉa arom',
Radie de ĝoj' aŭ inspiro,
Vekinte la homon en hom'!





Krokodiloj

Esperantistoj, ne krokodilu,
Gardu la lingvon sana kaj forta,
Ke Esperanto plu stele brilu
Bonesperiga, riĉa, belvorta!

Samideanoj, ne krokodilu,
Helpu la lingvon vivi libere,
Ke Esperanto vere jubilu,
Evoluante triumfespere!

Karaj amikoj, ne krokodilu,
Uzu la lingvon zorge kaj vaste,
Ke Esperanto ne ludsimilu
Plu estingate ĉiam pli draste!..


Dankon, Tiĥvin'!

Freŝa aero.
Hela muzik'.
Dolĉa vetero.
Voĉ de amik'.

Brilo de lago.
Rosa aŭror'.
Kantoj de tago.
Festa humor'.

Novaj stimuloj.
Sun' en ĉiel'.
TEMaj gratuloj
Por Mikael'.

Ĝojo sen rando.
Varmo sen fin'.
Kaj Esperanto.
Dankon, Tiĥvin'!



Renkontiĝo de Amikoj



La 2-an –
11-an de
aŭgusto 2014
en la vilaĝo
Ĉibit de
Respubliko
Altajo
sukcese pasis
“Renkontiĝo
de Amikoj –
9” (RA-9). La
E-aranĝon
partoprenis
30 personoj
kaj 1 hundo.

Ankaŭ la hundo komprenas kelkajn E-vortojn kaj E-komandojn. Fakte ĉiuj partoprenontoj jam la 1-an de aŭgusto kolektiĝis proksime de Barnaulo, kaj la komuna karavano startis al Ĉibit.

27 personoj venis el Rusio: 8 pesonoj kaj la hundo – el Novosibirsk, 5 personoj – el Tomsk, 4 – el Krasnojarsk, 3 – el Tjumenj, po 2 – el Samara, Jekaterinburg, po 1 – el Novokuzneck, Sankt-Peterburg, Moskvo. Po 1 persono venis el Germanio, Francio kaj Hispanio. La seksa aparteno: 10 viroj, 20 virinoj kaj 1 hundino.

Enkadre de RA-9 okazis seminario pri la aktuala politika situacio en la mondo, kiun iniciatis germana e-isto Eric Rademacher. Plejparte temis pri la situacio en Krimeo, Ukrainio, NATO-landoj, EU-landoj kaj en aliaj landoj. La diskutojn partoprenis Eric Rademacher, Rafael Mateos Gonzales, Tierri Mouden, Mansur Mamkin, Saŝuk, Vladimir Minin kaj kelkaj aliaj. Entute partoprenis pli ol dek personoj.

RA-10 planatas por somero 2015 apud Krasnojarsk en la naturrezervejo “Stolbi”.

<reu-agado>





Чăваш Республикн
Эсперанто-Ассоциацийĕ
Esperanto-Asocio
de Ĉuvaŝa Respubliko

Rusia Esperantista Unio
Российский союз эсперантистов

RUSIAJ ESPERANTO- TAGOJ “Multlingva Rusio”

AntaŭRET:

Riĉa programo
en Sankt-Peterburgo
kaj Niĵnij Novgorod

14 - 21
julio
2015

6 - 13

Aleksandr Blinov
al.blinov@gmail.com

Svetlana Smetanina
svsmetanina@yandex.ru



Sankt-Peterburgo

Niĵnij Novgorod

Ĉeboksaro